

# Ld Progreso

REDACTIE-  
COMITÉ

G. P. DE BRUIN  
G. J. DEGENKAMP  
F. FAULHABER

**STUDIEBLAD VAN DE BOND  
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**  
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL  
f 1.75 per Jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.  
Postgiro 881139

W. F. KRUIT  
H. KUYT  
JAC. LEM JR.  
H. VAN LIER  
J. VAN SCHEEPEN  
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

## SINGULARO - PLURALO

I.

Ekzistas aferoj, kiuj unuavide ŝajnas tre simplaj kaj tuj kompreneblaj, sed kiuj ĉe iom detala konsidero montriĝas efektive komplikitaj. Unu tia afero estas la ideo singularo-pluralo. Por bona kompreno oni devas konsideri ĝiajn diversajn aspektojn: la ĝenerale lingvistikan, la logikan — kaj nelogikan — flankojn, la nacilingvajn regulojn, kutimojn kaj iliajn influojn, kaj por nia celo: iliajn efikojn en Esperanto.

Unuavide oni komprenas, ke singularo estas unu, kaj pluralo pli ol unu. Certe, sed tio estas nur la elementa ideo! Ni memoras iaman diskuton en L.P. pri la demando, ĉu unu kaj duona estas pluralo aŭ ne. Logike oni povas argumenti, ke duono ne estas tuto, ke unu kaj duona do estas du diversaj aferoj. Per ekzemplo: unu guldeno plus duona guldeno estas unu kaj duona guldenoj? Laŭ opinio de kelkaj la plurala „j” ne taŭgas, ĉar duona guldeno ne estas guldeno. Logike ne, sed gramatike ĝi estas tia! Gramatike eĉ falsa guldeno estas guldeno. Do, ĉar oni povas paroli pri aŭtentika kaj falsa guldenoj, oni povas samprave paroli pri unu kaj duona guldenoj; kaj ne necesas esprimi tiun ideon per: unu guldeno kaj duono.

Ni konsideru alian aspekton de l' afero: Oni povas distingi inter individuaj kaj kolektivaj ideoj. La kolektiva ideo esprimiĝas en Esperanto ofte per la sufikso „ar”: „homo — homaro, arbo — arbaro”. Sed ne ĉiam! Ankaŭ multaj aliaj vortoj enhavas kolektivajn ideojn. La ideoj „familio, grupo, societo, klubo, armeo, grego, geedza paro” k.m.a. estas sendube singularaj. Sed en la ĉiutaga lingva uzado ofte superas la plurala senco de l' kolektiva ideo. Tio okazas ne nur en simplaj paroloj; sed eĉ en la literaturo, la nederlanda multege pli ol la Esperanta, oni trovas amasojn da ekzemploj, en kiuj la aŭtoro nekonscie sin lasas influi de tiu plurala senco. En sia verko „Bijgedachten en Botsingen in de Taal” prof. Gerlach Royen mencias tre interesan kaj grandegan kolekton da tiaj formoj, gramatike nepreeraj aŭ kritikindaj, sed facile klarigeblaj laŭ la penso aŭ nekonscia krompenso de la skribintoj, kiu psikologie superas la singularan ideon pri kolektivo. Ni menciuj ekzemplon: „De lieve familie (sing.), die met hun vijven twaalf kamers bewoonden, vonden (plur.) het

echter niet nodig ons onderdak aan te bieden". Gramatike la vorto „vonden" ja devas esti „vond".

En Esperanto oni ne povas tiom ofte fari tiajn erarojn, ĉar la verbo ne havas apartajn formojn por la pluralo. Sed koncerne la pronomojn oni kelkfoje pekas. Ne estas mirige, se oni ekzemple parolas aŭ skribas pri „estraro" aŭ „familio", do pri singularoj, kaj daŭrigas la frazon per „ili" anstataŭ per „ĝi". En la nederlanda lingvo singularan vorton ofte influas tuj sekvanta vorto plurala. Ni citu el la nomita verko: „De helpt daarvan zijn joden". Gramatike tio devas esti „is". Sed tiu „is" sonus tiom strange antaŭ la pluralo „joden", ke oni jam ne povas gramatike korekte diri: „De helpt is joden".

Se la subjekto de la frazo konsistas el vera subjekto kun komplemento, ekz. „amaso da homoj, nombro da ĉeestantoj" k.s., la verbo kaj eventuale sekvanta predikativa adjektivo logike rilatas al la kerno de l' subjekto, do al „amaso, nombro". Ekz.: „amaso da homoj staras mirigita; nombro da ĉeestantoj estis favora al la propono" (ne: „mirigitaj, favoraj"! ). Tamen, eĉ en Esperanto ofte la komplementoj „da homoj, da ĉeestantoj" nekonscie superas la singularan ideon de la kerno; kaj same kiel en la nederlanda frazo „er stonden een hele bende mensen" (el la menciita verko), oni povas legi en Esperanto: „nombro da libroj estis difektitaj". Facile klarigebla tio estas, ĉar logike la difektiteco koncernas ne la nombron, sed la librojn mem; gramatike la vorto tamen koncernas la nombron.

Per la jenaj ekzemploj oni esprimas nederlande du diferencajn ideojn: „een paar mensen liepen op straat" (kelke da homoj) kaj „een paar mensen liep op straat" (paro da homoj).

Jen alia aspekto: Ni kutimas en ĉiu lingvo nomi iujn aferojn singularaj, aliajn pluralaj, ne konsiderante, ke inter iuj pluralaĵoj troviĝas objektoj, kiuj, kvankam konsistantaj el pli ol unu parto, tamen formas unu tuton. Ni menciuj la nederlandajn pluralaĵojn: „hersen, lendenen, ingewanden, bretels", kiuj en Esperanto estas nepre singularaj: „cerbo, lumbo, intesto, ŝelko". Sciante tion, oni jam ne miras, ke ankaŭ aliaj lingvoj havas siajn pluralaĵojn, kiuj ne kongruas kun la Esperantaj kaj nederlandaj konceptoj pri singularo. Ne estas do mirige, ke oni kelkfoje trovas la neĝustajn tradukojn „pantalonoj" kaj „kalsonoj" por unu tia objekto. En slavaj lingvoj ekzistas multaj tiaj pluralaĵoj. En la ĉeĥa ekzemple oni povas paroli nur pri „pordoj" kaj „pulmoj", kaj „unu pulmo" same ne ekzistas kiel en la nederlanda lingvo „unu cerbo" (een hersen). Eĉ nomoj de urboj kaj vilaĝoj ofte estas pluralaj. Sed ankaŭ en Esperanto ekzistas tiaj vortoj, nome „okulvitroj" por „bril". Ni konfesas, ke tia ideo povas kaŭzi ian embarason, se oni deziras paroli pri unu aŭ pliaj tiaj objektoj. Ni atentu ankoraŭ, ke la nederlanda vorto „haar" havas singularan kaj pluralan sencojn: unu haron kaj harojn aŭ hararon. Kaj la vorto „snor" (antaŭe oni parolis ankaŭ pri „snorren" aŭ „knevels") havas nur pluralan tradukon: „lipharoj".

Afereto, pri kiu ni, nederlandanoj eĉ ne pensas, estas, ke „ij" en nia alfabeto ne estas unu litero, kvankam oni ĝin prezentas tia. Ĝi estas kombinaĵo el du literoj, same kiel „ei". Similan literkombinon oni trovas en ĉeĥaj vortaroj: „ch".

(Daŭrigota).

# POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 6. Vertaal in Esperanto:

De gebiedende wijs.

„Piet, er wordt gebeld, doe open!“ Even later komt een heer de kamer binnen. „Neemt u plaats, mijnheer“, zegt vader, terwijl hij hem een stoel aanbiedt. De heer blijft echter staan en zegt: „Weest u zo goed om luid te spreken, ik ben wat doof.“ Vader sprak luider, opdat mijnheer hem zou kunnen verstaan. Na een lang gesprek zei de heer eindelijk: „Laat ik gaan, het is al laat!“ „Het is nodig, dat u spoedig terugkomt“, antwoordde vader. „Wanneer moet ik terugkomen?“ vervolgde de heer. „Ik verzoek u terug te komen, wanneer u tijd hebt“, antwoordde vader.

Vertaling van opgave 4.

Ĉiu jar<sup>1)</sup> nia asocio organizas kongreson en unu el<sup>2)</sup> la urboj en la regiono de la nederlanda lingvo. Ĉi tiun jaron<sup>1)</sup> la kongreso okazos<sup>3)</sup> en Heerlen. Se mi havus<sup>4)</sup> tempon, mi certe irus<sup>4)</sup> tien; sed bedaŭrinde, mi ne povas trovi tempon por tio. Mi tre bedaŭras tion, ĉar tiaj<sup>5)</sup> kongresoj estas tiom<sup>6)</sup> lernigaj<sup>7)</sup>. Se<sup>8)</sup> mi la sekvontan jaron<sup>1)</sup> havos tempon, mi partoprenos la kongreson, kie ajn<sup>9)</sup> ĝi estos. Se la vojaĝkostoj ne estus<sup>4)</sup> tiom altaj<sup>10)</sup>, multe pli da<sup>11)</sup> esperantistoj irus<sup>4)</sup> al Heerlen. Feliĉe, ĉi tiuj kongresoj okazas jen<sup>12)</sup> ĉi tie, jen tie. Tial ĉiu povas de tempo al tempo partopreni tian<sup>13)</sup> grandan kunvenon.

1) Ook: *En ĉiu jaro, ĉiujare*; niet: *ĉiu jaro*; als men geen voorzetsel gebruikt is dit een rechtstreekse bepaling, welke een *n* als uitgang krijgt. 2) Niet: *de*; in uitdrukkingen als „één uit meerdere“ gebruikt men het voorzetsel *el*. 3) Niet: *okazas*; hoewel men gewoonlijk in het Nederl. de tegenwoordige tijd gebruikt voor zaken in de toekomst, bijv.: „Ik kom morgen“, is dit uit de betekenis van de zin te constateren; voor zulke gevallen gebruikt men in Esperanto de vorm van de toekomstige tijd, dus overeenkomstig de betekenis. 4) Niet: *Se mi havis tempon*; hier heeft men te doen met de voorwaardelijke wijs; voor deze vorm gebruikt men in het Nederl. meestal de verleden tijd; men vrage zich bij dergelijke gevallen steeds af: komt de handeling werkelijk tot stand? Is dit niet het geval, dan de voorwaardelijke wijs. 5) Niet: *tiuj*, met „zulke“ wordt „dat soort“ bedoeld, wat vertaald wordt met *tia*. 6) Ook: *tiel*. 7) Ook: *instruaj*; niet: *lernemaj*, het achtervoegsel *em* drukt een voortdurende neiging uit, bijv.: *la infano estas lernema* (leergierig), maar: *tiu leciono estas lerniga*, (*igas lerni* = doet leren, dus: leerzaam). 8) Niet: *kiam*; *se* duidt hier op een voorwaarde, *kiam* heeft betrekking op tijd en zou hier betekenen „Op het moment dat ik tijd zal hebben“. 9) Niet: *ankaŭ*; de uitdrukkingen „waar ook, wanneer ook, hoe ook“ enz. vertale men met: *kie ajn, kiam ajn, kiel ajn, kiom ajn, kia ajn*. 10) Niet: *alta*; *vojaĝkostoj* is meervoud.

Dem.: Ĉu „li staris sendecida“ ne estas pli bona ol „sendecide“?

Resp.: „Sendecida“ koncernas unuavice la personon; pro tio la adjektivo estas preferinda. Sed sendube en tiaj esprimoj la eco transiras ofte kvazaŭ maniero al la ago; pro tio la adverba uzo ne estas erara. Kelkrilate la eco precipe esprimiĝas per la ago, ekz.: „li rigardas ĝoje, ĉar li estas ĝoja.“

GEBONDEN JAARGANG 1946 „LA PROGRESANTO“  
voor slechts f 1.75 — Libroservo, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

# DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

J. Lem.

Opgave 6. Vertaal in Esperanto:

1. Albert Hahn was een der beste caricatuurtekenaars. 2. Een getekend portret van zijn vader hing aan de muur. 3. Teken nooit een stuk (*dokumento*), waarvan de inhoud u niet duidelijk is. 4. De kist was getekend (gemerkt) met /p/. 5. Maak niet zo'n leven; men kan zijn eigen woorden niet verstaan (vert.: horen). 6. Nergens is men volkomen veilig (*sendanĝera*); allerlei gevaren bedreigen steeds ons leven. 7. Zij schonk het leven aan een welgeschapen (*belstatura*) dochter. 8. Leven en beweging kenmerken (*signi, karakterizi*) de jeugd (*junago*). 9. Hij bereikte de leeftijd van 82 jaar. Zijn leven en werken waren gewijd aan het welzijn en geluk zijner medemensen (*proksimuloj, kunvivantoj*). 10. Na een levendige discussie nam men het bestuursvoorstel aan. 11. Door sparen (vert.: sparende) slaagde hij er in zich een klein kapitaal te verschaffen. 12. Bescherm de dieren, spaart de vogels. 13. Een breuk bestaat uit een teller en een noemer. 14. Herstel die breuk in uw rijwiel bijtijds, opdat u geen ongeluk overkome. 15. Een liesbreuk; een schipbreuk; een bankbreuk.

Vertaling van opgave 5.

1. Kelkaj el tiuj ĉi mebloj estas difektitaj. 2. Duo da domoj estis ruinigata de la brulado (incendio). 3. Kiam ŝi vidis (Vidante) la infanojn tiom (tiel) gaje ludantaj, ŝi diris: kiom feliĉa estas la juneco! 4. Kiam ŝi vidis (Vidante) la gaje ludantajn infanojn, mi ne povis ne ridi (mi vole nevole devis ridi). 5. Li kondukis kiel senhonta brutulo (malĝentilulo). Mi ne komprenas, ke li ne hontas pri (pro) sia konduto. 6. Bonvolu ekzakte informi min pri ĉi tiu afero. 7. Ni informis nin (informiĝis) pri liaj konduto kaj kapabloj kaj ricevis tre kontentigan respondon. 8. Pro manko de petrolo la lampo estingiĝis. Ni do ne estingis la lampon. 9. Li sin prezentis unu el niaj amikoj. Imagu tian friponon! 10. Ni ĝojas revidi vin; eksidu kaj rakontu al ni ion (iom) pri viaj travivaĵoj. 11. Allasu lumon kaj aeron en vian loĝejon; tio estas saniga. 12. Mi dankas vin pro via interesiĝo; mi estas sana kiel fiŝo en la akvo.

---

Dem.: Kiu traduko estas pli bona por: later bemerkte hij, dat hij toch bedrogen was, ĉu: poste li rimarkis, ke li tamen estas trompita" aŭ: "... estis trompita"?

Resp.: Ne temas pri pli aŭ malpli bona traduko. Nur la frazo kun „estas" estas korekta traduko.

La dependa propozicio „ke li tamen estas trompita" havas ne rektan formon. Se ĝi havus formon rektan, ni dirus: „li rimarkis: mi estas trompita". Nu, en Esperanto en tiaj propozicioj la tempoformo estas la sama, ĉu la formo estas rekta aŭ ne; en la nederl. lingvo ne estas tiel. Komparu:

Ik zie, dat het paard valt — ik zie: het paard valt =

mi vidas, ke la ĉevalo falas — mi vidas: la ĉevalo falas;

ik zag, dat het paard viel — ik zag: het paard valt =

mi vidis, ke la ĉevalo falas — mi vidis: la ĉevalo falas;

ik zie, dat het paard gevallen is — ik zie: het paard is gevallen =

mi vidas, ke la ĉevalo falis — mi vidas: la ĉevalo falis;

ik zag, dat het paard gevallen was — ik zag: het paard is gevallen =

mi vidis, ke la ĉevalo falis — mi vidis: la ĉevalo falis.

La pluskvamperfekton „estis -inta" ni do tute ne bezonas en tiaj frazoj. Pri tiu ĉi, cetere nefacila temo, ni siatempe verkos detalan artikolon.

# POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres, Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 9. Vertaal in Esperanto:

Laat iedereen maar eens zijn gedachten onderzoeken. Hij zal bevinden, dat ze zich altijd bezig houden met het verleden of de toekomst. We denken bijna nooit aan het heden. En als we er al aan denken, dan is het slechts om er licht aan te ontlenen aangaande onze toekomst. Het tegenwoordige is nooit ons doel. Het verleden en het tegenwoordige zijn onze middelen. Alleen de toekomst is ons doel. Derhalve leven we eigenlijk niet, maar hopen te leven en bevinden we ons nooit gelukkig, maar maken ons klaar gelukkig te zijn, maar het gevolg is onvermijdelijk, dat we het nooit zijn.

(Pascal).

Opgave 10. Vertaal in het Nederlands:

PLEJ NOVA MONDLINGVO.

Aperis en la ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Elkovis ĝin iu F. Musil, kaj li donis al ĝi la nomon „Komun”. Konsekvence li povas kun bona konscienco aserti, ke ekzistas en la mondo jam milionoj da „komun”istoj. Sed estas verŝajne, ke tiu ruzeto al s-ro Mus(kapt)il ne multe utilos.

Laŭ aserto de ĵurnalisto, tio estis ĝis nun la sesa provo pri kreado de facilà interkomprenigilo internacia. La naivulo! Li ekhavis apopleksion, se li vidus eĉ nur duonkompletan liston de „mondlingvoj” jam elkovitaj kaj... morte-naskitaj. Urtiko. („Heroldo de Esp.”).

Vertaling van opgave 6.

Dum<sup>1)</sup> kelkaj jarcentoj<sup>2)</sup> la libro akompanas la homaron, dum malpli ol unu jarcento la libro akompanas ankaŭ la vivon de preskaŭ ĉiu okcident-eŭropano<sup>3)</sup>. Kiu serĉas nur plezuron<sup>4)</sup> kaj distron<sup>5)</sup>, trovos en miloj da romanoj kaj rakontoj<sup>6)</sup> bone aŭ malbone verkitaĵ<sup>7)</sup>, bone aŭ malbone tradukitaĵ, bone aŭ malbone presitaĵ, la dumtempano<sup>8)</sup> forgeson, kiun li avaras<sup>9)</sup>. Kiel ni envidus al ni kaj aliaĵ<sup>10)</sup> por<sup>11)</sup> forgesi la proprajn zorgojn post tago de pezo<sup>12)</sup> kaj streĉa laboro en la aventureco de alia ekzisto? Eble, ke ni neniam travojaĝos<sup>13)</sup> la regionojn, kien kondukos nin la verkisto; sed, ĉu ni (ne) jam estas tie?

Dr. Garnt Stuiveling.

Vertaling van opgave 7.

1. Holle vaten klinken het hardst<sup>14)</sup>. 2. Met één been in het graf staan. 3. Na regen komt zonneschijn. 4. Wie het eerst komt, het eerst maalt. 5. Op heterdaad<sup>15)</sup>.

1) *Sinds* betekent hier: gedurende. 2) Niet *centjaro*. *Cento da jaroj* is *jarcento*. 3) Ook: *eŭropa homo*. 4) Ook: *plezuro*. 5) Ook: *amuzo*. 6) Het is duidelijker hier direct het zelfst. naamw. te zetten, alvorens al die bijvoeglijke bepalingen te vermelden. 7) Niet: *skribi*, wat betekent: figuri vortojn per literoj. 8) *Dum* als voorzetsel is hier op zijn plaats: *forgeso dum (iu) tempo*. 9) Sterker dan *deztras*. 10) *Het* wordt niet vertaald. 11) *Por* kan ook worden weggelaten. 12) *Hard* heeft de betekenis van *zwaar*. 13) *Vojaĝi* is onovergankelijk. Het wordt overgankelijk door aanhechting van een voorzetsel. 14) De Esperanto-spreekwoorden vertalen we zoveel mogelijk met een equivalent in het Nederlands. Natuurlijk kan men meermalen verschillende spreekwoorden vinden, die op eenzelfde Esperanto-tekst betrekking kunnen hebben. 15) Niet: *schuldbewust*.

Dem.: Kelkaj lernolibroj instruas, ke oni devas diri ekz.: „Mi ŝatas scii tion, kio okazis”, sed ne: „Mi ŝatas scii kio okazis. Mia opinie tio ne estas ĝusta.

Resp.: Se la ago „ŝati” aŭ alia ago koncernas nepre nur ian aferon aŭ objekton mem, do ne tutan okazajon, la instruo estas bona. Sed ĝenerale oni povas konsideri la tutan dependan propozicion kiel objekton. Tiukaze oni ne bezonas aldoni „tion”, do ankaŭ ne en via ekzemplo, en kiu la objekto estas ne „kio”, sed „kio okazis”.

# ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

H. Velthove.

*Onderwijzer:* Nou, jongens, vandaag zullen we eens kijken, wat jullie nog weten van de werking en de onderdelen van een viertact benzine motor.

*Piet:* vertel eens aan de hand van deze plaat, wat A, B en C zijn en waartoe ze dienen.


*Piet:* A is de zuiger, die in de cylinder B op en neer kan bewegen. Aan de zuiger bevindt zich de drijfstang C, door middel

*Instruisto:* Nu knaboj, hodiaŭ ni esploros, kion vi ankoraŭ scias pri la funkcio kaj la partoj de kvarcikla bezinmotoro.


*Petro:* vi klarigu helpe de ĉi tiu bildo, kion prezentas A, B kaj C kaj por kio ili utilas.

*Petro:* A. estas la piŝto, kiu povas moviĝi en la cilindro B supren kaj malsupren. Je la piŝto troviĝas la trans-

Schema v.e. 4-tact  
benzinemotor



Skemo de 4-cikla  
benzinmotoro



van de zuigerpen D draaibaar aan de zuiger verbonden. Aan het andere eind is de drijfstang aan de kruk E van de krukas F gemonteerd.

*Onderw.:* Goed zo. Karel, waartoe dient de krukas?

*Karel:* Om rond te draaien.

*Onderw.:* Dat is geen goede definitie. Henk, zeg jij het eens.

*Henk:* Om de rechthoekige beweging van de zuiger in een ronddraaiende beweging van de as om te zetten.

*Onderw.:* En waarom bevinden zich boven in de cilinder die schijfjes en waar dienen ze voor?

misia stango C turnebla ligita je la piŝto pere de la piŝtoakso D. Je la alia finaĵo la transmisia stango estas muntita turnebla je la kranko E de la krankŝafto F.

*Instr.:* Bone. Karlo, por kio utilas la krankŝafto?

*Karlo:* Por turniĝi.

*Instr.:* Tio ne estas taŭga difino. Henriko, diru vi.

*Henriko:* Por ŝanĝi la rektlinian moviĝon de la piŝto je turniĝa de la akso.

*Instr.:* Kaj kial supre en la cilindro troviĝas la malgrandaj diskoj kaj por kio ili utilas?

# TRA NIA LITERATURO

## VIVO VOKAS.

originale verkita de Stellan Engholm.

La libron oni povas rigardi kiel daŭrigon de „Infanoj en Torento”, ĉar la personoj jam ludis rolon en la du volumoj de tiu verko. Dume ili jam fariĝis junuloj, ekkonis la problemojn de la vivo kaj, kvankam trankvile vivantaj ekster la bruo de la mondo, tamen montriĝas iomete pli ol ordinaraj homoj: ili havas siajn idealojn, fariĝis adeptoj de Esperanto, en kies movado ili partoprenas. Cetere, elstaraj eventoj ne okazas en la rakonto.

La nomo de l' aŭtoro jam garantias bonan lingvajon. Lia stilo estas, kiel ĉiam, simpla, senpretenda, sen elstaraj esprimoj aŭ modernaj gramatikaj formoj, sed plene konformiĝas al la simpla rakonto.

Kritike legante, oni tamen ĉiam trovas esprimojn aŭ vortojn iel rimarkindajn. Ankaŭ en tiu ĉi libro ili ne mankas. Ni menciuj:

*La industrio glutas la unuan ludlokon de la infanoj* (9-20); *malgrandaj potoj havas orelojn* (11-19); *se li foje interŝovas iun jes aŭ ne* (20-3); *ŝia lango laboras* (20-16); *ŝlimaj ŝercoj* (21-15); *sinforeca metio* (31-31); *la ĵano velis tra la spaco* (38-2); *ŝi iam pale sugestis* (47-20); *maljuna kromhomo en juna familio estas malbona afero* (47-24); *la kantoturdoj senlace flutis ŝiajn tonĉenojn* (56-15); *mi volas fari laŭ mia kapo* (uit/het hoofd) (124-6); *bovintrankvile* (108-4); *oni kuras de vidpunkto al vidpunkto, oni kaŝludas kun si mem* (108-23); *vi aspektas, kvazaŭ alia muŝo estus fluginta en vian kapon* (129-19); *la ekonomio funkcias sen grincado* (150-30); *tranĉis la frazon* (brak de zin af) (100-19); *kelkaj seĝoj atingis pensian aĝon* (120-4); *nu ja* (wel ja) (112-15); *ahimforeste* (afwezig) (106-20).

El gramatika vidpunkto interesas:

*Ĉiameco* (41-31); *kubmetro* (49-17); *ioma anst. iom da* (7-31); *la kanto sonis pli forta kaj gaja* (anst. forte, gaje) (25-14); *ĉiondetrua* (146-13); *frufreue* (122-30); *litnaji* (120-10); *bubaĉi* (125-32); *oni paŝos vin* (95-32); *diris al ili ĝisrevidon* (28-20); *boeco* (46-30).

Ni rimarku, ke la al Engholm kutima *tiam kaj tiam* por nia „nu en dan” en ĉi tiu verko pli kaj pli cedas al la pli flua *jen kaj jen*, kelkloke alternita per *foje, foje*. Anstataŭ la ĝenerale uzataj ec-vortoj, en kiuj la sufikso ofte estas superflua aŭ eĉ erara, Engholm preskaŭ regule uzas la pli korektan formon sen sufikso: *proksimo, libero, afablo, memstaro, malproksimo*.

Ni konstatas konsekvencon forlason de l' artikolo antaŭ *Patro, Patrino*, kies granda komenclitero jam indikas, ke la aŭtoro konsideras tiujn vortojn ĝenerale propraj nomoj.

Kvankam Engholm kutimas regule uzi post *kvazaŭ* kondicionalon, ni tamen trovas kelkfoje indikativon: *kvazaŭ li volas montri* (32-14); *kvazaŭ li komencis timi* (57-23). Frapis nin la uzo de *da* post *kontentige*, kiu vorto efektive havas tiufraze signifon de kvanto: *kandeloj, kiuj donis kontentige da lumo* (31-1).

Kiel ĉiam, ankaŭ nun Engholm regule uzas „sen” antaŭ infinitivo.

Iom troas en la libro, precipe en ĉapitro VIIa la esprimo *unu la alian*, kiun ni prefere vidus kelkfoje alternata per *inter-* aŭ *reciproke*.

Kritikindaj estas niaopinie: *la tuta ideo kuŝas* (= konsistas) en tio (63-20); *ĝi kostas nenton* (= nentom) (44-19); la kelkfoja uzo de infinitivo post la kopulativo *ŝajni*. Prezeraroj estas supozeble: *ili en multe* (= multo) *similis al ni* (18-29); *kiu igis vin danci kun si* (= ŝi) (62-4); *io, kiu* (= kio) (64-10).

Fine: anstataŭ la kutimaj, sed longaj vortoj *stacidomo* kaj *vagonaro* ni trovas regule *stacio* kaj *trafno*. Cetere, neologismoj estas tre maloftaj.

Malgraŭ la malmultaj kritikindaĵoj kaj persone preferataj formoj tiu ĉi verko estas nova pruvo pri la stilista kaj rakontista talento de l' aŭtoro.

*Henk:* Dat zijn kleppen. Klep G dient om het benzine-luchtmengsel toe te laten tot de cilinder en klep H is nodig om het verbrande mengsel af te voeren.

*Onderw.:* Goed. Wim, vertel jij nu eens hoe de zuiger tot beweging gebracht wordt en wat er verder gebeurt.

*Henr.:* Ili estas valvoj. Valvo G utilas por enlasi benzin-aermiksajon en la cilindron kaj valvo H estas necesa por ellasi la brulintan miksajon.

*Instr.:* Bone. Vilhelmo, vi klarigu, kiel la piŝto fariĝas en mova stato kaj kio plie okazas. (Daŭrigota)

# DE WERKWOORDEN

## WEDERKERENDE WERKWOORDEN (REFLEKSIVAJ VERBOJ).

(Slot).

### 4. Wederkerende werkwoorden en onovergankelijke werkwoorden met *iĝi*.

Een geheel ander onderwerp, waarin ook een moeilijkheid is vervat, wier oorzaak in de nationale talen schuilt, en wel meer dan in onze taal in de slavische, is het verschil tussen een naar betekenis wederkerend werkwoord en dezelfde stam met de uitgang *iĝi* (*trovi sin* en *troviĝi*, *etendi sin* en *etendiĝi*, *alproksimigi sin* en *alproksimigiĝi* e.d.).

Tussen beide vormen bestaat een wezenlijk verschil, dat echter niet altijd even duidelijk uitkomt, en dat in onze literatuur, vooral in oudere werken, maar al te vaak bijna uitgewist is. De oorzaak van die onduidelijkheid is ongetwijfeld het feit, dat de auteur van Esperanto, wiens moedertaal een slavische taal, het Pools was, sterk beïnvloed werd door zijn nationale taalregels, die, wat dit onderwerp aangaat, nog veel meer onduidelijkheid bevatten dan de nederlandse. Zo zien we veelvuldig *trovi sin* gebruikt voor *troviĝi*, *bani sin* i.pl.v. *baniĝi*, maar ook omgekeerd.

Het verschil tussen beide vormen is dit:

Het overgankelijke en wederkerende werkwoord (*trovi sin*, *alproksimigi sin*, *etendi sin*, *bani sin* enz.) geeft een werking aan, die welbewust op het onderwerp wordt uitgeoefend. *Li banas sin* betekent, dat hij zichzelf baadt, het baden dus verricht op zichzelf, precies zoals bij *li lavas sin*, *li razas sin*.

De onovergankelijke, dus niet-wederkerende vorm met *iĝi* drukt in wezen dezelfde werking uit, maar niet, of minder doelbewust, onwillekeurig a.h.w. een komen of worden in een toestand. Zo is *klini sin*: zichzelf buigen, maar *kliniĝi*: buigen, in gebogen toestand geraken, door een of andere omstandigheid gebogen worden.

Enkele voorbeelden mogen dit verschil verduidelijken:

*Mi turnis min dekstren. La rado turniĝis.*

*Li streĉis sin por aŭskulti. Liaj maskoloj streĉiĝis.*

*La hundo sternis sin sur la tapiŝo. La tapiŝo sterniĝis sur la planko.*

*Mi klinis min por levi la objekton. La branĉo kliniĝis pro sia pezo.*

*Li fleksis sin ĉiudirekte. La arbeto fleksiĝis pro la vento.*

*Rapide li alproksimigis sin. La tempo alproksimiĝas.*

*Li banis sin en la rivero. La pejzaĝo baniĝas en la sunlumo.*

*Longe eraririnte en la arbaro, mi subite (re)trovis min en konata loko. La libro troviĝas en la ŝranko.*

---

## REDAKCIA KORESPONDO.

Al k-do M. L. en L.: Via demando pri klarigo koncerne neuzon de adjektivo en frazoj kia „mi trovis tiun rozon velkinta” ne estas al ni klara. „Velkinta” ja estas adjektivo! Bonvolu pliklarigi!

Vian detalan pritrakton pri verboj, derivitaj el participoj, adjektivoj k.s., ni nun ne respondu. Post nelonge vi trovos tre detalan respondon pri tiu temo sub „De Werkwoorden”, kiu supozeble kontentigos vin. Bonvolu mencii kie vi trovis la frazon „bulo da tero, kiun kunkuntenis la radikoj de granda kampa floro”.

---

## ĈU „SVISA” AŬ „SVISIA”?

Iu leganto ne kontentas pri la traduko *svisia* por *zwitsers*, kiu iam troviĝis en L.P., ĉar, kiel li opinias, la adjektiva finaĵo devas sekvi tuj post la radiko *svis*, do: *svisa*. La radikoj *svis*, *franc*, *belg* k.s. signifas homojn. Ekzakte la adjektivoj *svisa*, *franca*, *belga* do iel rilatas al homoj. Ofte oni bezonas adjektivojn, kiuj pli rilatas al al ŝtateco aŭ landeco ol al la loĝantoj. Tiukaze oni povas logike aldoni -a al la nomo de la lando mem, do: *svistaj* (aŭ *svisujaj*) *montoj franca* (*francuja*) *klimato*, *belgia* *registaro*. La formoj kun -io, resp. kun -ujo, do estas korektaj. Kutime oni tion tamen ne faras, sed skribas simple: *svisaj montoj*, *franca klimato*, *belga registaro* k.t.p.

Aldone: pri la landnoma sufikso -io jam okazis multaj disk(p)utoj. L. K. ne aprobis ĝin. La praktiko ĝin tamen akceptis.